

**3a DIMANĈO DE ADVENTO 11-a de decembro 2016**

## **ĈU ESTAS VI, KIU DEVAS VENI, AŬ NI DEVAS ATENDI ALIAN?**

***El la evangelio laŭ Mateo 11, 2-11***  
**Komento de p. Alberto Maggi OSM**

***En tiu tempo Johano estis en malliberejo, sed li aŭdis pri la faroj de Kristo. Tiam li sendis kelkajn el siaj disĉiploj, por demandi lin: „Ĉu estas Vi, kiu devas veni, aŭ ĉu ni devas atendi alian?” Jesuo respondis: „Iru kaj sciigu al Johano tion, kion vi aŭdas kaj vidas: blinduloj vidas, lamuloj iras piede, lepruloj estas purigataj, surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj estas anoncata la evangelio. Beata estas tiu, kiu fidus al mi.”***

***Kiam ili reiris al Johano, Jesuo komencis paroli al la homamasoj pri li: „Por kion vidi vi iris en la dezerton? Ĉu junkon skuatan de la vento? Kion do? Ĉu homon lukse vestitan? Sed tiuj, kiuj portas luksajn vestojn, troviĝas en la palacoj de la reĝoj. Kion vi volis vidi? Ĉu profeton? Jes, mi diras al vi, eĉ pli ol profeton.***

*Li estas tiu, pri kiu estas skribite:  
,Jen mi sendas antaŭ vi mian heroldon,  
kiu preparos al vi la vojon.’*

***Vere mi diras al vi: Inter naskitoj de virinoj ne estis pli granda ol Johano, la Baptisto. Tamen la plej malgranda en la regno de la ĉielo estas pli granda ol li.”***

La evangeliisto Mateo verkas por Juda komunumo, kaj prezentas la figuron de Jesuo laŭ la modelo de la vivo kaj de la faroj de Moseo. Moseo liberigis sian popolon, igante Dion venigi la dek plagojn, la famajn dek plagojn de Egiptujo, kontraŭ tiuj kiuj opoziciis al la liberigo de la Judoj el la sklaveco, Nu, la evangeliisto prezentas Jesuon kiu plenumas ne dek plagojn, dek punfarojn kontraŭ siaj opoziciantoj aŭ siaj malamikoj, sed dek farojn per kiuj li

transdonas vivon, kaj transdonas vivon ankaŭ al siaj kontraŭuloj, al siaj malamikoj. Ĉio tio perturbas, ĉar la agado de Jesuo ne estas tiu atendita, tiu kiu estis anoncita de Johano la Baptisto – ni tion memorigas, la Mesio ekzekutisto kiu havas la hakilon en sia mano, ĉiun arbon kiu ne donas frukton li hakas kaj ĵetas en la fajron – ĉi tiu Mesio kiu venus dividi la popolon en purulojn kaj malpurulojn, bonulojn kaj malbonulojn. Kaj fakte, ĝuste Johano kriziĝas. Ni legu la evangelion de Mateo, ĉapitron 11, versiklojn 2-11.

"...*Johano estis en malliberejo...*": la evangeliisto konsideras jam konata la sciigon ke Johano estas en malliberejo, kvankam reale tion li diros nur en la posta ĉapitro 14. Kial li estas en malliberejo? Laŭ Mateo, pro tio ke Johano la Baptisto estis kulpiginta Herodon ĉar li prenis al si kiel edzinon la edzinon de sia frato, sed iu tiutempa historiisto, Jozefo Flavio, en la "Judaj antikvaĵoj", liveras politikan interpreton de la malliberigo kaj poste de la murdo de Johano la Baptisto. Skribas Jozefo Flavio, ke Herodo estis zorgoplena pro la sukceso, pro la homamasoj kiuj sekvdas la Baptiston, kaj diras: "Tial Herodo decidis, ke estas tre preferinde frapi anticipe kaj liberiĝi je li, antaŭ ol lia agado kondukos al ribelo". Do laŭ Jozefo Flavio ekzistas politika motivo. Johano estas en malliberejo, ni dirus en la supermalliberejo de fortikaĵo, konstruita de Herodo la Granda, ĉe la orienta bordo de Morta Maro, Maĥeronto.

"...*li aŭdis pri la faroj de Kristo...*": temas pri ĉiuj faroj per kiuj Jesuo, la Mesio, transdonas vivon ankaŭ al la pekuloj, ankaŭ al la malamikoj.

"... *Tiam li sendis kelkajn el siaj disĉiploj...*": strange aperas la disĉiploj de Johano la Baptisto, evidente ili ne akceptis Jesuon kiel iun kiun oni sekvu.

"... *Ĉu estas Vi, kiu devas veni, aŭ ĉu ni devas atendi alian?*": la demando de la Baptisto tute aspektas kiel ekskomuniko, ĉar ĉi tiu Jesuo ne estas tiu anoncita, tiu Mesio ekzekutisto, tiu Mesio kiu venis plenumi la punon de Dio. Kaj tiam Johano la Baptisto, en profunda krizo, sendas al li ĉi tiun ekskomunikon: *Ĉu estas Vi, kiu devas veni, aŭ ĉu ni devas atendi alian?*

Jesuo ne respondas al la polemiko per teologiaj, bibliaj argumentoj, sed per siaj faroj.

"*Jesuo respondis: "Iru kaj sciigu al Johano tion, kion vi aŭdas kaj vidas"*, nome, tion kion vi spertas. Kaj ĉi tie Jesuo listigas ses farojn, ses agojn, la nombro ses memorigas la tagojn de la kreado, do Jesuo, plilongige al la Dio de la kreado, daŭre transdonas vivon, ja ili ĉiuj estas faroj per kiuj oni transdonas, oni redonas, aŭ ĝojigas la vivon de la homoj: "... *blinduloj vidas, lamuloj iras piede, lepruloj estas purigataj, lepruloj estis taksataj ne malsanuloj, sed malbenitoj, punitoj, "... surduloj aŭdas, mortintoj leviĝas, kaj al malriĉuloj estas anoncata la evangelio"*, nome la bona sciigo. Kaj kiu estas la bona sciigo atendata de la malriĉuloj? La fino de la malriĉeco.

Ĉi tiun liston Jesuo prenas el la faroj de la Mesio, kiaj ili estis anoncintaj de profeto Jesajo, en du ĉapitroj de lia libro, en ĉapitro 35 kaj en ĉapitro 61, sed, en ambaŭ pecoj, Jesajo estis anoncinta ankaŭ la venĝon de Dio kontraŭ la idoloj, kontraŭ la pekuloj. Jesuo preterlasas tion: la agado de Dio, pere de Jesuo, estas propono de amo al ĉiuj, forestas ĉia formo de venĝo aŭ de puno. Jen kial Jesuo proklamas beata, do estas nova beateco en ĉi tiu evangelio, "...tiun, kiu fidos al mi", laŭvorte, kiu ne skandaliĝas pri mi. Kiu estas la skandalo? Ĝi estas la skandalo de mizerikordo. Strangas ĉi tio. Dum la puno, la puno de Dio sendube timigas, sed ne skandalas la homojn, mizerikordo skandalis kaj daŭre skandalas la homojn, precipe la religiemajn homojn, tiujn

kiuj opinias ke Dio amas ilin pro iliaj meritoj, pro iliaj streboj, kaj ne toleras ĉi tiun bildon de mizerikorda Dio, mizerikorda Dio signifas ke lia amo ne konas la barojn starigitajn de la homoj, lia amo volas atingi ĉiujn.

Jesuo estis anoncinta tion: lia Patro ne estas la Dio de la religio, en ĉiu religio Dio premias la bonulojn kaj punas la malbonulojn. Jesuo estis dirinta: ne, la agado de la Patro estas kiel tiu de la suno kiu brilas super la malbonuloj kaj la bonuloj, kaj same la pluvo. La agado de la Patro de Jesuo estas tiu de transdono de amo, sendepende de la konduto kaj de la respondo de la homoj. Jen tio, kio skandalas: ke ankaŭ kiu ne meritas ĝin, ankaŭ la neinduloj, ankaŭ la malpuruloj, la pekuloj, povas esti celo de la amo de Dio, sen antaŭa pentofaro, sen antaŭa puriĝo, ĝi estas la skandalo de la mizerikordo. Nu Jesuo proklamas beataj tiujn kiuj ne skandaliĝas.

"*Kiam ili reiris al Johano*", ili foriras sen ia ajn reago, kio signifas unuflanke nekomprenon, aliflanke malakordon kun tio kion Jesuo diris, "*Jesuo komencis paroli al la homamasoj pri li: „Por kion vidi vi iris en la dezerton? Ĉu junkon skuatan de la vento?”*". Estis proverbeca la agado de kano (aŭ de junko), ĝi estis ankaŭ en konata fablo de Ezopo. Kio estas kano? Ĝi estas tiu kiu kliniĝas je la vento, estas la bildo de la oportunisto, de tiu estas ĉiam preta klini la dorson, kondiĉe ke li gardu sian postenon. Vento blovas de unu flanko, de la alia flanko, kano kaj junko kliniĝas ĉiam, jen do la bildo de oportunisto.

"*Por kion vidi vi iris en la dezerton? Ĉu junkon skuatan de la vento? Kion do? Ĉu homon lukse vestitan? Sed tiuj, kiuj portas luksajn vestojn, troviĝas en la palacoj de la reĝoj*", en la palacoj de la reĝoj estas korteganoj. Kiuj estas la korteganoj? Ili estas tiuj flatemaj al la laŭvica potenculo, ĉiam pretaj ŝanĝi flagon, ŝanĝi livreon, ŝanĝi kredon, kondiĉe ke ili restu ĉiam akvosupre.

"*Kio do?*" asertas Jesuo, "*Kion vi volis vidi? Ĉu profeton? Jes*", respondas Jesuo, "*mi diras al vi, eĉ pli ol profeton*". Kial pri Johano la Baptisto Jesuo asertas ke li estas pli ol profeto? Ĉar Johano la Baptisto estas tiu kiu estis sendita de Dio prepari la vojon al Jesuo. Tiam Jesuo komprenigas al ni, ke por esti senditoj de Dio, kunlaborantoj de Dio, oni povas esti nek oportunistoj, nek flatemuloj, sed oni devas ĉiam iri rekte antaŭen laŭ sia vojo.

"*Li estas tiu, pri kiu estas skribite*": kaj ĉi tie la evangeliisto kunmetas du esprimojn de la Malnova Testamento, el la libro de Eliro kaj el profeto Malaĥio, "*Jen mi sendas antaŭ vi mian heroldon, kiu preparos al vi la vojon*". La evangeliisto prezentas la figuron de Johano la Baptisto samkiel tiu de Moseo, kiu kondukis sian popolon al la Promesita Lando, sed li mem ne eniris tien. Estos poste Jesuo kiu kondukos ĉi tiun popolon al la liberiĝo.

Kaj fine la laŭdo de Jesuo: "*Vere mi diras al vi: Inter naskitoj de virinoj ne estis pli granda ol Johano, la Baptisto. Tamen la plej malgranda en la regno de la ĉielo*", la regno de la ĉielo, ni tion memorigas, en Mateo estas lia komunumo, iu alternativa komunumo en kiun oni eniras per la akcepto kaj la bonvenigo de la unua beateco, tiu de la malriĉeco - beataj la malriĉaj en spirito ĉar ilia estas la regno de la ĉielo - "*estas pli granda ol li*". Johano la Baptisto ne povis eniri en tiun komunumon ĉar li estis malliberigita, kaj precipe li ne povis renaskiĝi, renaskiĝi el la Spirito, transiri de naskito de virino al filo de Dio.